

Ludwig Uhland,
La kapelo

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Supre staras sur la monto
La silenta kapeleto,
En la valo, ĉe la fonto
Ĝoje kantas paštisteto.

Sonorado, mortkantado
Nun eksonas tra l' silento, -
Haltas knabo en kantado
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto
El la valo ĉiu venos.
Ankaŭ vin, ho paštisteto,
Oni iam tien prenos.

...

Ludwig Uhland,
La kapelo

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Supre tronas sur la monto
La kapelo en kviet'.
En la valherbej' ĉe l' fonto
Ĝoje kantas paštknabet'.

Kun funebra sonorilo
Ektimigas mortkantad'.
Finas tuj la ĝojjubilo
De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojintoj post la morto
Supren en la tombojn venos
Paštoknabo, laŭ la sorto,
jen ja Morto vin eĉ prenos.

...

Ludwig Uhland,
La kapelo

tradukita de Manfred Retzlaff

Supre staras la kapelo
Sur la pinto de la mont',
La paštist' en suna helo
Ĝoje kantas ĉe la font'.

Triste la sonorileto
De funebro sonas de
La altaĵ' tra la kvieto,
La paštist' jam kantas ne.

Ĝin ne povas aŭdi soni
La gajuloj post viv-fin'.
Ho, paštisto, iam oni
Portos supren ankaŭ vin.

...

Ludwig Uhland,
Die Kapelle

Droben stehet die Kapelle,
Schauet still ins Tal hinab.
Drunten singt bei Wies' und Quelle
Froh und hell der Hirtenknab'.

Traurig tönt des Glocklein nider,
Schauerlich der Leichenchor;
Stille sind die frohen Lieder,
Und der Knabe lauscht empor.

Droben bringt man sie zu Grabe,
Die sich freutent in dem Tal:
Hirtenknabe, Hirtenknabe!
Dir auch singt man dort einmal.

...

Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhof, *1859-12-15 – †1917-04-14).

Arg-639-1288 (2012-11-02 16:27:28)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ en www.literaturo.dk/kapelo.htm, ene de la listo <http://www.literaturo.dk/enhavo.htm>.

Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).

Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html>.

Traduko de la Germana poemo “Die Kapelle” de LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).

Arg-639-1287 (2012-11-02 08:49:45)

Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11).

Arg-639-1286 (2012-11-02 16:53:38)

Vidu: http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl_103.html. Pri la poeto vidu la vikipediejon http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland. La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Conradin Kreutzer. La melodio estas audebla tie: <http://www.musicenet.org/robokopp/Lieder/drobenst.html>.